

**ESTRARA JARRAPORTO DE ILEI DE 2022-08 ĜIS 2023-07.  
POR LA KOMITAT-KUNSIDO DE LA 7-A DE AŬGUSTO 2023**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI de 2022-08 ĝis 2023-07.

**ENHAVTABELO:**

**EVENTOJ**

ILEI-Kongreso kaj Simpozio 2023

**INSTANCOJ**

Estraro, Komitato, Sekcioj

**PROJEKTOJ**

Esperanto-Kursaro "Tibor Sekelj"; "30 Oraj Horoj"; Esperanto-kurso en Senegalio; Tutmonda Komuna Legado; Homa Ĉeno

**KAPABLIGO**

Tago de Lernado; Forumoj; Universitata Agado; Forumoj por Instruistoj; Eldonado; IPR; JA; ILEI en la Reto

**KUNLABORO KUN ENMOVADAJ INSTITUCIOJ**

UEA, TEJO, IFEF, BEMI, Edukado.net

**KUNLABORO KUN EKSTERMOVADAJ INSTITUCIOJ**

UNESKO, FIPLV, Ĉina Komunikila Grupo, Universitato Adam Mickiewicz, Zaozhuang-Universitato

**EVENTOJ**

**ILEI-Kongreso kaj Simpozio 2023:**

La Kongreso kaj la Simpozio okazos en Linjano Orsabra (itale: Lignano Sabbiadoro) la 5-12-an de aŭgusto 2023, kune kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ĝis nun al la du kun-kongresoj aliĝis preskaŭ 400 homoj. La kongresa temo, organizita de Laura Brazzabeni kaj Alessandra Madella, estos "Instrui Esperanton en lernejoj" kaj tiu de la simpozio, organizita de Fernando Pita, estos "Instrui (ne nur Esperanton) ekster lernejoj". Grandan rolon ludos interalie ankaŭ trejnseminario pri interkultura komunikado, organizota de Radojica Petrović, dank'al la kunlaboro kun Itala Instituto de Esperanto, AMO-seminario de Stefan MacGill, "virina agado" zorge de Alessandra Madella kaj lingvo-kursoj de Larisa Osadchuk kaj Alain Delmotte.

**INSTANCOJ**

**Estraro:** Prezidanto: Ahmad Reza Mamduhi, Irano; Sekretario: Elena Nadikova, Rusio; Estrarano pri Financoj: Karine Arakeljan, Armenio; Vic-prezidanto: Alessandra Madella, Italio; Estrarano pri

Kongresoj: Laura Brazzabeni, Italio; Estraranoj: Fernando Pita, Brazilo; Marija Jerković, Kroatio; Radojica Petrović, Serbio.

La estraro regule kunvenas por pritrakti diversajn problemojn kaj trimonatajn estrarraportojn regule verkas Elena Nadikova.

**Komitato:** La komitat-kunsido okazis la 10-an de decembro kun 33 komitatanoj de 22 landoj en 4 kontinentoj. La protokolo kaj la aprobita laborplano troveblas en la retejo de ILEI : [www.ilei.info](http://www.ilei.info).

**Sekcioj:** Marija Jerković, kun la helpo de Renato Corsetti, komencis kontakti la sekciestrojn de ILEI, ricevante respondojn, kiuj ebligas koni pli funde la staton de la ligo. Ĝisdatigita listo kaj adresoj de la sekciestroj kaj reprezentantoj troviĝas en la retejo de ILEI (<https://www.ilei.info/instancoj/sekcioj.php>)

## **PROJEKTOJ**

### **Esperanto-Kursaro "Tibor Sekelj" : Lernu Esperanton en via lingvo.**

La projekto, lanĉita de IrEA, celas instrui Esperanton en lingvoj, en kiuj la instruado maloftas, kiel la indonezia, vjetnama, rusa kaj albana (en la pasinteco okazis kursoj en la persa, kurda, franca, svahila/sūahila, araba kaj verŝajne estonte okazos en la ukraina). Leciono en la araba furoras en la Jutuba kanalo de ILEI “Esperanto + Edukado ILEI”.

### **“30 Oraj Horoj”: Lerneja Projekto**

Tiu instrua projekto kun Itala Instituto de Esperanto celas altigi la metalingvistikajn kapablojn de gelernantoj en superaj mezlernejoj per la instruado de Esperanto unue al iliaj etataj instruistoj, kiuj poste mem instruos al ili. Laura Brazzabeni kaj Brunetto Casini gvidis teamon por pretigi allogan video-kurson por instruistoj, dum Alessandra Madella verkis sciencan dokumenton por ricevi la subtenon de la lernejoj aŭtoritatoj de regionoj Toskanio kaj Friulo Venecio-Julia, kiu donis patronecon.

### **Esperanto-kurso en Senegalo**

Dank'al tiu projekto de UEA, ILEI, Senegala Esperanto-Asocio kaj Kampanjo Hans Bakker, okazis prepara Eo-kurso en Senegalo septembre-decembre 2022 antaŭ la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto. Motoro de la iniciato estis Mireille Grosjean kaj gravan rolon ludis la Afrika Komisiono de UEA.

### **Tutmonda Komuna Legado**

Por celebri la Tagon de la Esperanta libro/Zamenhofan Tagon 2022, ILEI proponis simbolan tutmondan legadon de la rakonto *Antimilitisto* de Lu Xun kaj de *La Stranga Butiko* de Raymond Schwartz.

### **Homa Ĉeno**

Dum la ILEI-kongreso 2022 estis lanĉita projekto de internacia Homa Ĉeno pri edukado, laŭ ideo de Maximiliano Garcia. Jam 403 homoj el kvin kontinentoj partoprenis en la ses unuaj partoj kaj ekis la pretigado de la sepa, kiu iĝos verŝajne tre longa dum la someraj kongresoj de 2023.

## **KAPABLIGO**

### **Tago de Lernado**

Marija Beloŝević sukcese organizis la Tagon de Lernado dum Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, la 9-an de aŭgusto 2022, kun la temo "Instruado de Esperanto laŭ diversaj lingvoj, kulturoj kaj regionoj" kaj la subtemo: "Pandemiaj spertoj kaj postpandemiaj tendencoj en instruado". Marija Beloŝević ankaŭ organizos la Tagon de lernado (01/08) dum la UK 2023 en Torino.

### **Forumoj**

Forumoj celas la lertigadon de Eo-instruistoj tra la mondo. Inter la diskut-temoj estis: "Pri la aprobita laborplano de ILEI" kaj "Specifaĵoj de lernado de Esperanto laŭ diversaj lingvoj, kulturoj, regionoj".

### **Universitata agado**

La 28-an de Oktobro, Alessandra Madella prelegis pri "The New Examinations of the Italian Esperanto-Institute" dum la 8-a Internacia Konferenco de Azia Asocio por Lingvo-testado (AALA), okazinta ĉe Anna University, Chennai, Barato. Raporto aperis en la Decembra bulteno de FIPLV.

La Universitata Laborgrupo, gvidata de Renato Corsetti, kunsidas rete ĉiumonate.

### **Forumoj por Lernejoj Instruistoj**

Laŭ iniciato de Didier Janot en junio 2023 ekis Zoom-forumoj por lernejoj instruistoj laŭ la modelo de la kunsidoj de la Universitata Laborgrupo. La dua forumo okazos dum la kongreso de ILEI en Linjano.

### **Eldonado**

Estrarano Fernando Pita pretigis por eldonado la aktojn de la simpozioj de ILEI de 2020-21, kiuj estos prezentitaj dum la Simpozio 2023.

Alessandra Madella ampleksigis sian dokumenton por la projekto "30 Oraj Horoj", kiu en majo 2023 aperis kun Edistudio en la itala kun la titolo *L'esperanto: facilità di apprendimento e aiuto nello studio di altre lingue* kaj en julio en Esperanto kun la titolo *Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*. La aŭtorino kaj la eldonisto Bruĉjo Kasini bonvenigas tradukojn al aliaj lingvoj kaj ne petas kopirajtojn, kondiĉe ke la eldono okazu nur surpapere kaj ke ili povu ricevi 10 senpagajn kopiojn por muzeoj, bibliotekoj kaj siaj personaj arkivoj.

Alessandra Madella kaj Luigia Oberrauch esperantigis la verkaron de la itala doktorino Antonietta Bernardoni, kompilita de Ermanno Tarracchini kaj Kolektivo Bernardoni. La verkaro estis eldonita bite kaj papere de ILEI en 2023. La bita versio elŝuteblas senpage el la retejo de ILEI kaj tradukoj de ĝi al aliaj lingvoj estas bonvenaj.

## ***Internacia Pedagogia Revuo (IPR)***

Redaktoro Jozefo Nemeth aperigis en la organo de ILEI interesajn artikolojn pri instru-rilataj temoj.

## ***Juna Amiko (JA)***

La 50-jara revuo *Juna Amiko*, danke al la redaktoro Stano Marček, aperigis artikolojn por lernantoj.

## **ILEI en la Reto**

Daŭre aperas informoj pri ILEI kaj ĝiaj partneroj en kanaloj de ILEI en Fejsbuko, Jutubo, Tvitero, Telegramo, tra dissendolistoj, krom en EsperRadio kaj en la retejo mem. Maximiliano Garcia lanĉis la projekton “Homa Ĉeno” por lertigi niajn membrojn pri video-farado kaj iniciatis kun Alessandra Madella Ma-Ga Filmojn. Cristina Bollini kompletigis analizon kaj purigadon de la retejo de ILEI, daŭre prizorgata de Jozefo Nemeth. Jozefo kreis en la retejo arkivon de IPR, dank’ al skanaĵoj de Zsófia Kóródy, kaj la dosierujon kun ĉiuj EKO-komunikoj de 2023 de Stefan MacGill, kiu ankaŭ ekverkis dokumentojn pri ILEI en la angla.

## **KUNLABORO KUN ENMOVADOJ INSTITUCIOJ**

### **Kunlaboro kun UEA**

ILEI en malsamaj manieroj kunlaboris kun UEA por kandidatigi por Premio Hamdan de UNESKO la projekton “30 Oraj Horoj”, la animacion “Kungfua Kunikleto” kaj “Edukado.net”, kiuj estis inter la triono da projektoj de la tuta mondo, kiuj sukcese trapasis la unuan selektan fazon en 2022, kvankam ili fine ne estis inter la premiitaj projektoj. La reprezentanto de ILEI ĉe UEA estis la prezidanto Ahmad Reza Mamduhi, dum la reprezentanto de UEA ĉe TEJO estis estraranino Aurora Bute.

Dum la UK de Torino, pri la tablo de ILEI dum la Movada Foiro (29/07) kaj la prezentado de ILEI (30/07) zorgis Alessandra Madella kaj Luigia Oberrauch, kiuj disdonis malnovajn revuojn de ILEI.

### **Kunlaboro kun TEJO**

La kunlaboro kun TEJO pri la komuna okazigado de la kongreso 2023 seninterrompe daŭras. La reprezentanto de TEJO ĉe ILEI estas la prezidanto Albert Stalin Garrido, dum la reprezentanto de ILEI ĉe TEJO estas Fernando Pita.

### **Kunlaboro kun IFEF kaj BEMI**

ILEI kunlaboras kun Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio, Biciklista Esperantista Movado Internacia kaj la Esperanto-Grupo “Giorgio Canuto” de Parmo kadre de la ekologia projekto VERDEN de Erasmus + KA2, helpe de Kosmo-strategio kaj UEA. La atingoj de la projekto estos prezentataj dum la UK de Torino (31/07).

### **Kunlaboro kun Edukado.net**

ILEI morale subtenis la retejon Edukado.net de Katalin Kováts, grava rimedo por Esperanto-instruistoj.

## **KUNLABORO KUN EKSTERMOVADOJ INSTITUCIOJ**

### **Kun UNESKO**

La reprezentantoj de ILEI ĉe UNESKO estis Emmanuel Desbrières, Maximiliano Garcia, Alessandra Madella kaj Didier Janot, kiu reprezentis ILEI dum la Internacia Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj en Parizo de la 13-a ĝis la 16-a de decembro 2022 .

### **Kun FIPLV**

Daŭras la kunlaboro kun Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj, kies membro ILEI estas. La kontaktpersono estas la prezidanto Ahmad Mamduhi, Karine Arakeljan reprezentis ILEI dum la dua Monda Kunveno de FIPLV la 26-an de majo. Verkis artikolojn por la bulteno de FIPLV Ilona Koutny (pri Universitato Adam Mickiewicz) kaj Alessandra Madella. En julio 2023 la jarraporto 2022 de ILEI aperis en Esperanto en la retejo de FIPLV: <https://fiplv.com/members-2/members-reports/>

### **Kun Ĉina Komunikila Grupo**

La 29-an de junio 2023 okazis la forumo “Kulturaj Interŝanĝoj kaj E-disvastigo en la Nova Epoko”, organizita de Ĉina Komunikila Grupo, kies parto Ĉina Radio Internacia nun estas, kunlabore kun ILEI. La forumo celis kundividi opiniojn pri rolo de Esperanto kaj eduko por kulturaj interŝanĝoj en la nova epoko por antaŭenigi realigon de la komuna celo de esperantistoj, ĉinoj kaj de ĉiuj homoj. La Prezidanto Ahmad Mamduhi kaj vicprezidanto Alessandra Madella estis invitataj paroli nome de la Ligo. Ahmad prezentis inde la instruistan ligan, prelegante pri eduka justeco. Alessandra parolis pri sia libro pri lernofaciliga Esperanto kaj pri la projekto “30 Oraj Horoj”.

La 20-an de julio 2023, Alessandra Madella reprezentis ILEI kaj Esperantujon en la Dua Forumo de Ĉina Komunikila Grupo en Ŝanhajo, inter pli ol 230 reprezentantoj de internaciaj organizoj, amaskomunikiloj, ĉinaj kaj eksterlandaj saĝbankoj, translandaj entreprenoj (<https://esperanto.cri.cn/2023/07/21/ARTI8XQ5JFzUTxGkAxcKO4IJ230721.shtml>).

### **Kun Universitato Adam Mickiewicz, Pollando**

ILEI morale subtenis la gravegan instruadon de Interlingvistiko kaj Esperantologio fare de Ilona Koutny kaj ŝiaj helpantoj.

### **Kun Zaozhuang-Universitato, Ĉinio**

ILEI morale subtenis la agadojn de la 4-jara Esperanto-fako kaj de la loka Esperanto-Muzeo.

Vic-prezidanto de ILEI: Alessandra Madella

Prezidanto de ILEI: Ahmad Reza Mamduhi

2023-31-07